Jarraporto de TEJO-estraro kaj -komisiitoj

Jaro 2010/2011

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Nieuwe Binnenweg, 176
3015 BJ, Roterdamo
Nederlando

Kompilita de Paulína Kožuchová
Bratislavo, la 23an de junio 2011

Aprobita de Komitato de TEJO
Kievo, la 16an de julio 2011

Enhavtabelo

Enkonduko 3
Administrado 3
Financoj 4
Landa Agado 6
Eksteraj Rilatoj 6
Kongresoj kaj Seminarioj 8
Centra Oficejo 9
Komitato de UEA 11
Reta Agado 11
Pasporta Servo 13
Adoleska Komisiono 15
Informado 15
Kontakto 17
TEJO-Tutmonde 18
TEJO-Aktuale 19
Listo de Mallongigoj 20

ENKONDUKO

Raportas Paulína Kožuchová, Ĝenerala Sekretario

Jen ni prezentas al vi raporton pri la jaro 2010-2011, la dua jaro de nia estrara oficperiodo, kiu jam baldaŭ finiĝos. Mi ĉefe taksas la jaron *sukcesa* ĝenerale, sed kompreneble kiel ĉiujare, troveblas kelkaj agadkampoj, kelkaj projektoj, kiuj sukcesis ne tiom kiom ni planis, kaj male ankaŭ kelkaj, kiuj estas aparte fierindaj – la tri plej grandaj atingoj de 2010-2011 laŭ mi estas: Eksteraj Rilatoj, Kontakto, kaj Seminarioj. Tamen: vidu vi mem en la raporto.

ADMINISTRADO

Raportas Paulína Kožuchová, Ĝenerala Sekretario

La Estraro ĉi-jare daŭrigis sian laboron en la sama seskapa konsisto kiel lastjare: Gregor Hinker (Prezidanto), Paulína Kožuchová (Ĝenerala Sekretario), Sergeo Tyrin (Kasisto), Oleksandra Kovjazina (Informado), Łukasz Żebrowski (Kongresoj, Seminarioj kaj Aktivula Trejnado) kaj Irmina Szustak (Landa Agado), kvankam fine de la oficperiodo jam videblis ke ne ĉiuj estraranoj povis dediĉi tiom da fortoj al TEJO kiel lastjare.

Okazis du fizikaj estraraj kunvenoj: novembre 2010 en la CO en Roterdamo, kaj aprile 2011 kadre de la Internacia Junulara Festivalo en Italujo. Krome regule ĉiumonate okazadis ankaŭ retaj kunvenoj de la Estraro per skajpo.

Dum la jaro estis nomumitaj kelkaj novaj komisiitoj: Michael Boris Mandirola ekgvidis la Komisionon pri Eksteraj Rilatoj, Haris Subašić transprenis de Irmina Szustak la Komisionon pri Afrika IJK, kaj fondiĝis ankaŭ la Adoleska Komisiono sub gvido de Adenjo Charrière. TEJO ankaŭ havas novajn redaktistojn: Rogener Pavinski por *Kontakto* kaj Daniel Mrázek por *TEJO-Tutmonde*, kiu iĝis kvarpaĝa rubriko ene de *Kontakto*. La postenon de TEJO-volontulo transprenis septembre 2010 Manuela Ronco post Alexandre Baudry, kiu siavice transprenis kunordigadon de *Pasporta Servo*. En la Komitato de UEA, TEJO-n reprezentas Nico Huurman kaj Marek Blahuš.

Estraranoj, komisiitoj kaj komitatanoj raportis pri siaj agadoj en ĉiumonata Komitata Cirkulero.

La nuna Komitato, kiu oficas ekde junio 2010, kunvenis dum la IJK en Kubo inter la 24-a kaj la 30-a de julio. Dum la kunveno, la komitatanoj kaj anstataŭantoj havis sume 20 voĉoj, krome ĉeestis la kunvenon 12 observantoj sen voĉdonrajtoj. La Komitato interalie aprobis la jarraporton de 2009-2010.

FINANCOJ

Raportas Sergeo Tyrin, Kasisto

Kiel eblas resumi koncize jaron, tre riĉan je diverstipa agado kaj rezulte, je multa laboro por la respondeculo pri financoj?

Lastjare mi raportis ke TEJO ricevis la plenan sumon el la administra subvencio de la programo *Junularo en Agado.* Ankaŭ por 2010 kaj 2011 estis prezentitaj – kaj akceptitaj – la subvencipetoj; pro tio interalie daŭre ornamas la ĉefpaĝon de tejo.org kaj *Kontakto*-n la ĉielark-kolora mevo. Tiu ĉi mono estas uzata ne nur por teni la oficejon kaj publikaĵojn (*TEJO-Tutmonde* daŭre vivas, eĉ se forme de rubriko!), sed ankaŭ por apogi aktivulojn – vidu pri tio sube. Krome, por la unua fojo dum tre longa periodo, TEJO petis kaj ricevis administran subvencion de EJF (je kiu oni rajtas nur se estis aprobita kroma por-agada peto en la koncerna jaro). Lastfoje tio okazis en 2006. Kvankam EJF „gratifikis“ per sufiĉe simbola sumo, tio pruvas ke agado ĝustamaniere prezentita kapablas alporti kapitalon el kromaj fontoj, kaj sekve indas investi je esploro de tiuj.

Mi raportu nun laŭorde pri la diversaj kampoj tuŝintaj la kason de TEJO:

IJK en Kubo

Kvankam neatendite, la kongreson okazintan en fora kaj nefacile atingebla loko, ĉeestis 181 personoj, el kiuj pluraj aliĝis surloke post partopreno en la UK, kaj pli ol 40 estis kubanoj! Tio certigis la financan sukceson de la kongreso, kiu rezultigis eĉ iometan gajnon. La profiton ricevas parte la landa sekcio, kaj parte la fondaĵo „Partoprenu IJK-n“.

Fondaĵo „Partoprenu IJK-n“ por la kongreso en Kubo

En 2010 la fondaĵo stipendiis 3 geaktivulojn, entute por la sumo de 1 500 € : Roger de Castro Gotardi (brazilano), Tina Tišljar (kroatino) kaj Luana Araújo de França (brazilanino).

Aktivula seminario por amerikanoj

La UK kaj IJK en Kubo prezentis unikan ŝancon kunigi gejunulojn el pluraj amerikaj landoj, kaj tuj antaŭ la kongresoj ILEI organizis sian seminarion kadre de kiu okazis ankaŭ aktivula trejnado. La partoprenintoj ne povas ĝui la luksecon de proksimaj kaj malmultekostaj E-aranĝoj, tial ilia ĉeesto estiĝis ebla danke al malavara financa kunlaboro de ILEI, TEJO kaj la Amerika Komisiono de UEA. TEJO kontribuis al la komuna subvencia poto per 1 500 €.

Fondaĵo „Partoprenu IJK-n“ por la kongreso en Ukrainio

Sojle de la IJK ĉi-jare estis elektitaj 3 personoj el inter 9 kandidatiĝoj. La fondaĵo premiis entute 690 €. Rilate tion, indas memorigi ke nuntempe la sola fonto pleniganta la fondaĵon

estas la profito de la IJK – kaj tial indas varbi ekstrajn kontribuojn, kiujn rekte ja profitos malpli-pagipovaj aktivuloj.

Seminario de TEJO kaj Skolta Esperanto-Ligo (SEL)

Komence de 2010, SEL proponis organizi komunan seminarion, kadre de sia 3-jara revigliga programo. Subvencipeto por ĝi estis prezentita en printempo al EJF, sed rifuzita kun ebleco re-peti kaj kun rimarkigoj kiujn flankojn de la aranĝo oni plibonigu (rilate programon, daŭron kaj nombron de trejnatoj). Tio estis farita en oktobro, sekvante la konsilojn skizitajn, kun sukceso: EJF aprobis subvencion de 9,000 € kaj sekve la seminario estis efektivigita en majo 2011, plenpartoprene de 19 personoj kaj 6 partatempaj. Raporto pri ĝi estas preparata.

Pasporta Servo

Du sinsekvajn petojn TEJO faris al EJF, rilatajn al la modernigo de PS. Pri la unua mi raportis lastjare, ĝi ebligis pagi la laboron de Joan Català; la dua kovras plibonigojn efektivigatajn ekde decembro far la urugvajano Daniel Bebelacqua (kies raporton vi povas legi pli sube). La plejmulto de la ŝanĝoj faritaj de li, tuŝas internajn teĥnikaĵojn – sed mi esperas ke en la proksimaj monatoj pli kaj pli oni konstatos la modifojn ekaperontajn en la retejo.

Eksteraj rilatoj

Tiu ĉi agad-kampo de TEJO subite (kaj bene!) reaktiviĝis, post kelkaj jaroj de silento. TEJO pagas ĉiujare kotizon al FoJE, kaj finfine la membreco en la tut-eŭropa organizo estas utiligata al pli aktiva kaj videbla agado ol muta reprezentado unu fojon jare ĉe la asembleo de membroj. La bunta agado signifas cetere fizikan partoprenon de aktivuloj en diversaj aranĝoj kiel Ĝenerala Asembleo aŭ Volontula Foiro; en 2010 tio rezultigis elspezojn de 1 267 € el kiuj EJF repagis 696 €. Por 2011 estas anticipitaj pli altaj elspezoj, kiuj tamen subtenas la gravan videbligadon de TEJO kaj Esperanto en diversaj rondoj, kaj permesas al esperantistoj aŭdigi sian voĉon kaj influi decid-procedojn.

Esperanta kino-festivalo

Dum la somero okazos en Brazilo la unua kino-festivalo en Esperantujo, organizata de Aleksander Osincev. Ĝi celas antaŭenigi E-kinarton kaj devus aparte allogi gejunulojn. TEJO estas oficiala partnero de la aranĝo kaj kontribuis por la okazigo de la festivalo per 800 €.

LANDA AGADO

Raportas Irmina Szustak, estraranino pri Landa Agado
kaj Łukasz Żebrowski, estrarano pri Kongresoj, Seminarioj kaj Aktivula Trejnado

„Partoprenu IJK-n“

Kiel ĉiujare, ankaŭ en 2011 ni lanĉis alvokon por la konkurso „Partoprenu IJK-n“, kiu celas finance subteni partoprenon de kelkaj aktivuloj en IJK 2011 en Ukrainio. Ĉi-jare pro malgranda profito de la antaŭa IJK ni disponis pri nur 690 eŭroj. La gajnintoj estas Przemysław Wierzbowski, Aurora Lunlum kaj Joni Kis-Lev.

KODEJO

Decembre 2010 TEJO denove lanĉis la demandaron KODEJO (Kompleta Demandaro por Esperantistaj Junularaj Organizoj) al siaj landaj sekcioj kaj aliaj junularaj organizoj. Pere de KODEJO 2010 ni celas kolekti gravajn informojn pri la junularaj organizoj. Ĉi-jare ni sukcesis kolekti respondojn de 33 junularaj organizoj, kio estas la plej granda nombro ĝis nun atingita en KODEJO. Gravas, ke estas inter ili ne nur Landaj Sekcioj de TEJO, sed ankaŭ organizoj, kiuj ankoraŭ ne havas tiun statuson. Tamen aliflanke estas ankaŭ Landaj Sekcioj, kiuj havas reprezentanton en la Komitato de TEJO, sed ne sukcesis respondi la demandaron. Pro multo da alia laboro kaj manko de homfortoj, ni ne sukcesis ĝis nun finprepari la raporton. Kolektitaj informoj estas nun analizataj kaj plenan raporton de KODEJO 2010 ni esperas prezenti al la Komitato dum IJK 2011. Sekve la raporto estos publikigita en tejo.org.

Afrika IJK

Bedaŭrinde la estraranino pri landa agado pro personaj kialoj ne povis laŭplane prizorgi la Komision pri Afrika IJK. Pro tio la gvida rolo en la projekto estis transdonita al Haris Subašić. Ni esperas, ke nun la Komisiono pli efike laboros por finfine atingi kontentigan rezulton.

EKSTERAJ RILATOJ

Raportas Michael Boris Mandirola, Komisiito pri Eksteraj Rilatoj

Mi jam komencis okupiĝi pri Eksteraj Rilatoj de TEJO per mia partopreno en Forumo Junulara Eŭropa reprezente al TEJO sed je pasinta aŭtuno mi oficiale posteniĝis kiel Komisiito pri KER.

Jarraporto de TEJO 2010/2011

Iam abundis aktivado de TEJO tiukampe; ĝi estis grava kaj efika, rezulte al partopreno de TEJO en internaciaj organizaroj kaj al rilatoj kun institucioj kaj aliaj organizoj, sed bedaŭrinde dum lastaj jaroj TEJO apenaŭ agis eskteren. Mi devis do klopodi rekonstrui rilataron surbaze de la spuroj, foje forgesitaj, de pasinta laboro kun nova teamo de homoj motivitaj.

FoJE-aferoj estas nun la plej elstara agada subkampo de eksteraj rilatoj por TEJO. Septembre Paulína Kožuchová partoprenis en Membrosubtena Semajno kun laborgrupoj kaj trejnadoj, ĉefe orientitaj al financaĵoj. En novembro TEJO-delegitaro (mi, Łukasz Żebrowski kaj Paulína Kožuchová) partoprenis la Ĝeneralan Asembleon de Forumo Junulara Eŭropa, tie ni klopodis pludaŭrigi la laboron intervjuante ĉiujn kandidatojn al nova estraro kaj aktive partoprenante en la laboro de la komisionoj. Aparte rimarkindaj estis la unuanima akcepto de niaj proponoj rilate al la dokumento pri la nova *Junularo en Agado*: FoJE petos al Eŭropa Komisiono kiel prioritatoj malfermon al partopreno de ĉiuj eŭropanoj, plisimpligon de la burokratio kaj agadkategoriojn pli malfermaj al novspecaj aranĝoj. Bedaŭrindas nur ke ni ne partoprenis estrarvoĉdonadon pro bagatela vekila problemo: oni estontece serioze atentu pri detaloj.

Post estraro, FoJE starigis laborgrupojn kaj spertulgrupojn por la nova estrarperiodo kaj TEJO klopodis envolviĝi pli profunde: ni prezentis kandidatojn por pluraj laborstrukturoj. Ni sukcesis en laborgrupo pri volontulado kie elektiĝis Quentin Weber-Seban por la mandato 2011-2012. Li partoprenis aprile en rilata kunveno.

TEJO partoprenis ankaŭ en la Membrokonsilio okazinta maje en Antverpeno kie la delegitaro (Paulína Kožuchová kaj mi) denove aktivis kaj sukcese subtenis interalie proponon pri vegetaranismo kiel baza opcio por manĝoj kaj ni decidis pliaktiviĝi kadre de la Eŭropa Jaro pri Volontulado: septembre en Bruselo okazos „Volontula Vilaĝo“ kaj, danke ĉefe al laboro de nia volontulino Manuela Ronco, TEJO okazigos tie aktivulan trejnadon kaj Esperanto-gustumadon al aktivuloj de aliaj volontulaj organizoj.

Krom agado ĉe FoJE, TEJO (rimarkite) ankaŭ revenis al UNESKO kie ĝi estis longe reprezentata kaj pasintan majon mi reprezentis ĝin kadre de Miksita Komisiono pri Junularo, helpata kaj subtenata de iama aktivulino Barbara Despiney. Tamen ni devas ankoraŭ decidi konstantan TEJO-reprezentanton tiukadre kaj kiel fruktodone partopreni en UNESKO-agado.

Estontece ni klopodos plivastigi niajn eksterajn rilatojn reaktiviĝante kadre de Unuiĝintaj Nacioj kaj priesplorante aliajn eblajn kadrojn ĉefe ekster Eŭropo kie nuntempe ni apenaŭ aktivas. Krome, konsciante gravecon de rilatoj al neesperanta mondo, ni celas instigi kaj subteni Landajn Sekciojn en iliaj klopodoj ĉefe rilate al partopreno en naciaj junularaj konsilioj.

KONGRESOJ KAJ SEMINARIOJ

Raportas Łukasz Żebrowski, estrarano pri Kongresoj, Seminarioj kaj Aktivula Trejnado

Internacia Junulara Kongreso

IJK 2010

La 66-a IJK okazis en Santa Cruz del Norte, Kubo. Partoprenis ĝin 181 personoj, do ĉi tiu IJK estas la plej granda el okazintaj en Ameriko. Sukceson pri nombro de partoprenantoj certe influis la proksimeco de la Universala Kongreso, okazigo de seminario kun ILEI antaŭ la UK kaj subvenciado de pluraj junaj kubaj esperantistoj, kiuj proprarimede ne povus viziti la kongreson. Kontribuo de TEJO en organizado de la IJK 2010 estis signife pli granda ol en antaŭaj jaroj. Tio estis tre grava, ĉar al la kuba junularo mankis ne nur organiza sperto, sed ankaŭ partoprena sperto en kongresoj (nur unu LKK-ano antaŭe partoprenis IJK-n). La 66-a IJK, konforme al la loko kie ĝi okazis, estis pli leĝera ol kutime, kaj laŭ kondiĉoj, pli luksa ol kutime. Tre grava atingo de la kongreso estas vigligo de la Junulara Sekcio de Kuba Esperanto-Asocio, kiu post IJK pligrandiĝis, aktiviĝis kaj organizas pliajn renkontiĝojn, pri kio oni povas legi en komitataj cirkuleroj kaj en revuoj de TEJO.

IJK 2011

La 67-a IJK jam tre baldaŭ okazos en Kievo, Ukrainio. La organiza teamo konsistas ĉefe el aktivuloj de ULEJ, refunkciigita antaŭ du jaroj. Monaton antaŭ la kongreso aliĝintaj estis pli ol 270 homoj. Lige kun petoj de la partoprenontoj, aŭtune 2010 la loko de la kongreso estis ŝanĝita de Hlibivka (apud Kievo) al Kievo mem. Ankaŭ aŭtune 2010 okazis mia vizito en Kievo, kie mi rakontis pri TEJO kaj IJK en kelkaj lokaj kluboj, kontrolis ejojn por la kongreso kaj renkontiĝis kun la organiza teamo.

IJK 2012

La loko de la 68-a IJK estis decidita decembre 2010. El kelkaj proponoj TEJO-Estraro elektis Japanion. JEJ invitis la kongreson al Naha en la insulo Okinava, sed jam nun ni scias, ke necesos ŝanĝo de la loko. La kialo estas striktaj reguloj de la ejo, kiujn ni devus sekvi dum la kongreso. Pro tio IJK 2012 plej verŝajne okazos en la urbo Tenri en la prefektujo Nara. Certaj informoj pri tio estos konataj dum la IJK en Kievo, kiun partoprenos la prezidanto de la japana LKK.

IJK 2013

La konkurso por organizi la 69-an IJK-n jam tre baldaŭ estos anoncita. Elekto de la loko estas planata por decembro 2011. Ĝis nun jam kelkaj landoj esprimis interesiĝon pri organizado de IJK 2013.

Seminarioj

Seminario kun ILEI en Matanzas, Kubo

Kunlabore kun ILEI kaj Amerika Komisiono de UEA, ni organizis semajnan semnarion en Matanzas, Kubo. Danke al subvencioj partoprenis ĝin ĉirkaŭ dudeko da junaj instruantoj kaj instruontoj de Esperanto el Latinameriko. La temaro de la seminario estis ĉefe rilata al lingvo kaj metodiko de instruado, sed ne mankis ankaŭ programeroj rilataj al la esperantaj movado kaj kulturo. Partoprenantoj de la seminario plejparte ĉeestis ankaŭ UK-n kaj IJK-n en Kubo. La stipendiojn financis ILEI, TEJO, UEA, Fondaĵo Mondo kaj privataj sponsoroj.

Seminario kun SEL en Varsovio, Pollando

Maje 2011 en Varsovio okazis 6-taga seminario „Konstruante surbaze de diverseco – kiel ricevi la plej bonon el interorganiza junulara kunlaboro?“ organizita de TEJO kaj SEL. Partoprenis 25 homoj ĉefe de Eŭropo, sed ankaŭ de Meksiko kaj Venezuelo. Inter ili estis ne nur Esperantistoj, sed ankaŭ kelkaj skoltoj, kiuj ekkonis la Internacian Lingvon ĝuste por ĉeesti tiun ĉi eventon. Lerninte la manierojn kunlabori, la partoprenantoj preparis projekton „Ĵamboreo“ kies celo estas okazigo de E-skolta renkontiĝo somere 2012. Lige kun tio ni esperas, ke la seminario, kiun ni financis danke al subvencio de Eŭropa Junulara Fonduso, estis nur komenco kaj ke ĝiaj rezultoj ankoraŭ plimultiĝos en venonta tempo.

CENTRA OFICEJO

Raportas Manuela Ronco, TEJO-volontulo

La volontulo Alexandre Baudry, el Francio, daŭrigis en sia posteno ĝis la fino de septembro, kiam li estis anstataŭita de Manuela Ronco, el Italio. La transdono de spertoj okazis dum la lasta semajno de septembro, kiam la du volontuloj kunoficis kelkajn tagojn en la CO, sed ankaŭ per ofta reta komunikado dum la sekva periodo.

La TEJO-volontulo okupiĝas pri la ĉiutaga oficeja administrado kaj pri la kontaktoj ene aŭ ekstere de la organizo. Tio inkluzivas la pritraktadon de la poŝto, papera aŭ reta, kaj la respondadon al demandoj kaj petoj de membroj, aktivuloj aŭ eksteruloj. La volontulo respondecas ankaŭ pri la komunikoj pere de la *Facebook*- kaj *Twitter*-kontoj de TEJO, kaj parte pri la publikigado de novaĵoj en *tejo.org*. Krome, li/ŝi ofte kunordigas kaj superrigardas la laboron de estraranoj, komisiitoj kaj aliaj aktivuloj, plifaciligante la komunikadon inter ili, memorigante taskojn kaj limdatojn, kaj ankaŭ estante la ĉefa kontaktpunkto kun la CO en Roterdamo. Dum la fizikaj kaj retaj kunsidoj, li/ŝi verkas la protokolojn kaj la taskolistojn. Grava parto de la laboro estas la pretigado de subvencipetoj kaj subvenciraportoj. Ĉi-jare estis interalie la pretigoj de du administraj subvencipetoj por 2011, la raporto pri la administra

subvencio 2010, kaj la subvencipeto por la TEJO-SEL-seminario „Konstruante surbaze de diverseco“ , kies raporto estas nun preparata.

Kadre de Pasporta Servo, la Oficejo havas kunrespondecon pri administrado de la retadresoj *pasportaservo@tejo.org* kaj *info@pasportaservo.org*. Ĝi ankaŭ ricevas la paperajn aliĝilojn, kaj konsekvence traktas ilin, membrigante tiujn gastigantojn en la retpaĝon. Okaze de la pretigado de la adreslibro 2010, la volontulo helpis redakti la datenojn, kaj provlegi la finan version.

Koncerne la rilatojn inter la Landaj Sekcioj kaj TEJO, la volontulo ĉi-jare partoprenis en la kolektado de informoj pro la enketo KODEJO 2010, kies enhavo estis iom renovigita, por ebligi pli profundan analizon pri la farto de la LS-oj. La respondoj al tiu ĉi enketo estis uzataj por ĝisdatigi la informojn pri TEJO kaj ĝiaj LSoj, aperantajn en la Jarlibro.

Cetere, la volontulo partoprenas en la vivo de la Centra Oficejo de UEA, kaj de tempo al tempo helpas pri komunaj taskoj. Tial, regule la volontulo voĉlegas artikolojn de la revuo *Esperanto* por esti senditaj al blinduloj. Tiuj agadoj inkluzivas ankaŭ la partoprenon en la Malferma Tago, kaj la reprezenton de TEJO tie.

La volontulo reprezentas la organizon ankaŭ okaze de diversaj aranĝoj. Dum la JES 2010 mi aranĝis TEJO-budon, por doni informojn al la partoprenantoj kaj kolekti aliĝojn aŭ abonojn. Dum la sama evento mi ankaŭ gvidis debatadon pri la agado de TEJO, inter kelkaj membroj kaj aktivuloj.

Dum la supre menciita seminario, mi okupiĝis ĉefe pri administrado kaj pri kunordigado de la komunikado inter la organizantoj. Krome, mi prelegis pri interkultura komunikado kaj interorganiza kunlaboro.

Aldone, nuntempe okazas preparoj por la someraj aranĝoj, precipe la IJK en Kievo, kie interalie kunvenos la komitato de TEJO, kaj la UK en Kopenhago, kie TEJO havos apartan rolon en la junulara kaj en la tema programo, ĉi-foje dediĉita al la Internacia Jaro de la Junularo.

Alproksimiĝante al la fino de la oficperiodo, mi povas diri ke tiu ĉi jaro de volontulado estis por mi plena de defioj kaj foje tre streĉa, sed riĉiga el pluraj vidpunktoj. Ĝi certe donis al mi multajn okazojn por lerni kaj akiri spertojn, ne nur labore sed ankaŭ persone. Mi multe ĝuis la kunlaboron kun la estraro kaj la aktivuloj de TEJO, kaj dankas tiujn kiuj daŭre subtenis min, praktike kaj spirite. Mi krome dankas pro ĉiuj la laŭdoj, la konsiloj kaj la kritikoj kiuj alvenis al la Oficejo, ĉar ili estis ege gravaj por mi kaj por TEJO.

Unu el miaj ĉefaj streboj kiel TEJO-volontulo estis doni atenton al la homaj flankoj de la organiza agado, instigante kunlaboremon kaj kreemon, kaj plifortigante la rilatojn de la asocio kun ĝiaj aktivuloj, membroj kaj uzantoj. Mi esperas vidi estonte pluajn paŝojn tiudirekte.

KOMITATO DE UEA

Raportas Nico Huurman, Komitatano A por TEJO en la Komitato de UEA

Mi mem bedaŭrinde ne povis ĉeesti dum la kunsido de la Komitato de UEA en Havano en 2010. Tamen ĉeestis Marek Blahuš el Ĉeĥio. Li prezidis la subkomitaton pri junularo tie. La subkomitato esprimis rekomendojn celante la plialtiĝon de partopreno de junuloj dum la UK-oj. La unua rekomendo rilatis al haveblo kaj frua diskonigo de modesta, malmultekosta loĝebleco dum la UK. La dua rekomendo rilatis al pli fruaj kaj klaraj informoj por unuafojaj kongresanoj por helpi al ili orientiĝi en la kongreso. La Komitato akceptis la rekomendojn de la subkomitato.

Dum la jaro mi abonis la retliston de la Komitato. Per ĝi alvenis amaso da mesaĝoj. Granda plimulto tamen ne rilatis al junulara agado ĝenerale aŭ al TEJO pli specife.

Dum la maja Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA, mi kunsidis kun Manuela (volontulo de TEJO) kaj du estraranoj de UEA , Claude Nourmont pri kongresoj kaj Loes Demmendaal pri TEJO. Ni priparolis kiel pli praktike allogi pli da junuloj al la UK-oj. Ni priparolis la situacion de la ĉijara UK en Kopenhago. Ambaŭ UEA (pere de la LKK) kaj TEJO (pere de DEJO) tiumomente ne havis tre efikan kontakton kun la prizorgantoj de la junulara programo. Tamen junulara programo okazos kaj malmultekosta loĝebleco por junuloj haveblas. Por sekvaj UK-oj ni interkonsentis ke devas esti pli frua kaj forta komunikado inter UEA, la LKK kaj la estraro de TEJO por certigi bonan kunlaboron. Manuela kaj mi substrekis ke la plej gravaj ingrediencoj por allogi junulojn al UK estas: malmultekosta loĝebleco, malmultekosta aliĝo al UK, ekzisto de interesa vespera programo kaj junulara ekskurso kaj eble karavano inter IJK kaj UK se distanco ebligas.

Estus bone havi pli detaligitan sekvon al la rekomendoj de pasintjara subkomitato pri junularo dum la ĉijara komitatkunsido.

Aŭtune, post la sperto kun anstataŭado de la ĉeĥa komitatanino, Marek Blahuš sinproponis al TEJO por fariĝi ĝia dua komitatano en UEA, kaj estis en Roterdamo oficiale nomumita tiu.

RETA AGADO

Raportas Marek Blahuš, Komisiito pri Reta Agado

Jam duan jaron mi en la posteno de Komisiito pri Reta Agado respondecis pri la reta ĉeesto de TEJO – precipe pri ties teknika subteno, forme de teĥnikaj laboroj kiuj siavice ebligas al la

Estraro kaj la ceteraj aktivuloj de la organizo efektivigi siajn proprajn taskojn pere kaj kun helpo de la interreto. Ĉar mi samtempe estas ankaŭ aktivulo de E@I, mi povis profiti tiun ligon per plifaciligi la necesajn interagojn inter TEJO kaj tiu ĝia eksa faka sekcio pri interreto.

TEJO posedas propran virtualan servilon luatan de la usona firmao midphase.com, kie gastas ĝiaj retregionoj pasportaservo.org kaj tejo.org. *Pasporta Servo* estas administrata de TEJO kiel aparta projekto inkluzive de sia reta prezento (nun ĉefa), dum miaj taskoj koncetriĝas ĉe tejo.org, kiu estas la oficiala retejo de TEJO. Krom la oficiala retpaĝaro de TEJO konstruita en la sistemo Drupal kaj provizanta dokumentojn, novaĵojn, forumojn ktp. rilatajn al la agado de TEJO, en la retejo situas ankaŭ kelkaj vikioj (la publika TEJO-vikio, la privata Estraro-vikio), diversaj servoj (ekz. sistemo por reta voĉdonado de la Komitato, enketa sistemo) kaj subpaĝoj (retpaĝaroj de kelkaj el la pasintaj IJK-j) kaj multspecaj ciferecaj dokumentoj (ofte valoraj atestaĵoj pri la historio de TEJO en la reta epoko). Mia tasko estas teni la tuton funkcianta, fari necesajn alĝustigojn, asisti al aktivuloj pri teknikaj aferoj kaze de bezono, kaj ankaŭ zorgi pri la ligitaj retpoŝtaj kontoj. Aperinta propono de la TEJO-Estraro komisii min per starigo de nova TEJO-retpaĝaro kaj engaĝigi min pli multe ankaŭ en ties enhava administrado ĝis nun ne ricevis konkretan formon.

Dum oktobro kaj novembro 2010 efektiviĝis transloko de la TEJO-retejo el la servilo de E@I al la nuna servilo, en kiu tiam jam estis gastigata Pasporta Servo. La retregiono tejo.org tiam tamen restis posedata de malnova aktivulo de TEJO kaj administrata de E@I. Por kompletigi la sendependiĝon necesis transigi la posedon al UEA, kio estis aranĝita per kunlaborigo de la koncernaj aktivuloj de E@I kaj UEA en oktobro 2010. Lige kun tio UEA pagis la retregionon por unu plia jaro. La ŝanĝo ebligis al TEJO mem administri la DNS-informojn de tiu retregiono, tiel ebligante starigon de la kromnoma subregiono kontakto.tejo.org por la reta prezento de *Kontakto*. En tiu momento, la sola retpaĝaro ankoraŭ iel dependa de E@I restis la hejmpaĝo de SEJU, la LS de TEJO en Svedio. Post provizora periodo de DNS-kromnomado, ĝi estis fizike forigita de la E@I-servila administranto en decebro 2010 kaj restarigita de la SEJU-estraro en nova loko ekster la serviloj de kaj E@I kaj TEJO, tamen kun konservo de la origina adreso seju.tejo.org.

Post la 66-a IJK okazinta en Kubo, mi helpis taŭge fermi ĝian retpaĝaron, gastigatan ĉe la TEJO-servilo, kiu plu estas trovebla tie kiel arĥivaĵo pere de la adreso www.tejo.org/ijk, simile kiel ankaŭ retpaĝaroj de ĉiuj aliaj IJK-j ekde 1999. Post mesaĝinterŝanĝo kun organizantoj de la 67-a IJK en Kievo, ili decidis starigi propran retpaĝaron por tiu kongreso, plene de ili administratan, troveblan ankaŭ per plusendo el la TEJO-retejo.

Ekde la pasinta jaro plu daŭris mia redaktado de artikoloj en la reta enciklopedio Vikipedio, inkluzive de multaj pri TEJO-rilataj temoj, precipe en Esperanto sed foje ankaŭ en aliaj lingvoj. Tiel ampleksiĝis ekz. la artikolo „IJK 2010“ aŭ laŭ specifa mendo de la respondeca TEJO-estrarano kreiĝis artikolo „IJK 2012“, enhavanta ankaŭ tiurilatan foton de mi faritan dum IJK 2010. Mi ankaŭ asistis pri Vikipedio-redaktado al kelkaj estraranoj kaj aktivuloj.

Aldone al la supre menciitaj longtempaj taskoj, mi ankaŭ plenumadis diversajn etajn taskojn, ofte subite aperintajn kaj urĝe solvendajn. Denove necesis ekz. kontaktiĝi kun la firmao kiu gastigas la servilon, ĉar ilia virtualservila politiko foje kaŭzas partan aŭ plenan malfunkciigon

de la servilo sen antaŭa averto, post kio necesas peti de ili riparon. Laŭokaze mi ankaŭ optimumigadis certajn agordojn de la servilo kaj administradis la retpoŝtajn kontojn kaj plusendajn adresojn @tejo.org, laŭ instigoj ricevataj de la Estraro aŭ aliaj kunlaborantoj.

PASPORTA SERVO

Pri la adreslibro

Raportas Aleks Baudry, kompilanto de Pasporta Servo 2011

Dum la jaro 2010-2011, la laboro koncentriĝis sur pretigo de la venonta eldono, sed tiel ke la laboro estu valora por sekvantaj jaroj. Tial estis starigita sistemo kaŝita en la retejo *pasportaservo.org*, kiu permesas al administranto redakti po dek kontoj samtempe. Eblo estis donita al landaj organizantoj por ke ili povu redakti la kontojn de samlandanoj kaj krei novajn kontojn. Samtempe oni invitis homojn ĝisdatigi siajn datenojn, kaj kontaktis la plej malretemajn. Al la datenbazo estis ankaŭ aldonitaj pliaj kampoj kiuj necesis por la libro.

Tamen la plano estis optimista kaj la ilo (kiun oni nomis *amasredaktilo*) bonorde ekfunkciis nur fine de februaro, poste sekvis periodo de redaktado enreta, kompilado kaj redaktado malreta. La tuto daŭris monatojn, pro la amplekso de la laboro, la organizo de la laboro kaj teknikaj malfacilaĵoj kaj eraroj. Konsekvence, je skribo de tiuj ĉi vortoj la adreslibro ankoraŭ ne finpresitas kaj ne senditas poŝtkesten, kvankam ĝi estis promesita por aprilo kaj nun somero baldaŭas.

Entute ĉijare nombriĝas 1089 gastigantoj el 90 landoj, multe malpli ol en la eldono de 2010 (1450 gastigantoj). La klarigo estas ke la eldono de 2010 havis artefarite tro da gastigantoj, ĉar oni aldonis antaŭajn gastigantojn eĉ se ili ne reagis ĝustatempe, kaj troviĝis duoblaĵoj. Ĉi-foje la datenbazo venas plejparte de la retejo, temas pri uzantoj kiuj gastigas kaj konsentis je apero en la adreslibro, al kiu aldoniĝas proksimume 50 gastigantoj kiuj donis vivsignon sed ne volas aperi en pasportaservo.org. Alivorte, estas malpli da gastigantoj, sed la kvalito de la informoj estas multe pli bona kaj fidinda, kvankam ĉiam eblas trovi erarojn kaj malfreŝaĵojn.

Tamen, eĉ se la nombro 1089 estas zorginda, ĝi pli-malpli kongruas kun la tendenco observita dum la periodo 2005-2008, kiam la gastigantaro konstante malkreskis de 1364 ĝis 1225.

La plej kritikinda eco de la eldono 2010 estis la mapoj. Ĉi-foje esploro estis farita por pretigo de pli belaj kaj legeblaj mapoj. Tiucele oni ekuzis GIS (geografi-informa sistemo) softvaron, nomita Quantum GIS. Ĝi permesis kaj faciligi laŭurban grupigon de la koordinataj punktoj videblaj sur la google-mapo de *pasportaservo.org*, kaj pretigi legeblajn mapojn. Ĝi permesis ankaŭ fari kontrolon, ekz ĉu la koordinatoj kongruas kun la datenoj (lando, regiono, urbo), kaj

tiel permesis ordigi la gastigantaron laŭ provincoj/ŝtatoj por kelkaj landoj (Brazilo, Francio, Germanio, Hispanio, Usono, Kanado).

En la maparo de la adreslibro troviĝas ankaŭ 2 superrigardaj mapoj (por la Mondo kaj Eŭropo) por faciligi la tralegadon. Kongrue kun la datenoj de la gastigantoj, la mapoj disponigas mallongigojn de regionoj/provincoj, por tiuj kie troviĝas gastigantoj.

Alia flanka aldonaĵo estas apero de la koresponda adreso kiam la loĝadreso ne validas por ricevo de poŝto, kiu estas markita per aparta simbola bildeto.

Por la venonta eldono esplorindus: La aldono de la kategorio *ĉiĉerono*, revizio de la kompilmetodo kiu enhavas fojfoje fuŝaĵojn, grupigo de gastigantoj laŭ provincoj en pli da landoj kaj/aŭ grupigo laŭ pli grandaj geografiaj regionoj, esploro rilate al etikedoj de mapoj, kiuj ne perfektas, formato de la telefonnumeroj, kaj certe multe pli.

Pri la retejo

Raportas Daniel Bebelacqua, programisto

Ekde majo 2010 mi transprenis la laboron modifi la retejon de PS sur la bazo jam ekzistanta, konstruita per Drupalo (sistemo por enhavmastrumado). Tiam la strukturo de la retejo jam estis kreita, funkcianta kaj estis agordita ĉio, kio estis agordebla per la administra parto de la sistemo. Kio mankis estis kio ne estis farebla per tiu administra parto kaj kion neniu alia disponebla modulo permesis fari. Do miaj ĉefaj taskoj estis eklerni pri la interna funkciado de la sistemo kaj krei kaj aldoni specifajn modulojn por atingi la petitajn celojn.

Plejparto de mia laboro estis lerni pri la interno de la sistemo, provi kaj korekti, kaj samtempe interkonsenti kun la respondeculoj pri diversaj teĥnikaj kaj administraj aferoj, kiuj aperadis dum ĉi tiu procezo; tial ne multe vidiĝas ankoraŭ pri la rezulto, kvankam la laboro estis sufiĉa.

La plej grava atingo estis la kreo de amasformularo, pere de kiu la LO-j (Landaj Organizantoj) povis prilabori kaj korekti la datenojn de la membroj, antaŭ ol pretigi la paperan version de la ĉijara libro de PS.

Nun mi laboras por finpretigi la formularon por ke la membroj mem povu denove prilabori la proprajn profilojn, kio okazos plej baldaŭ.

Diversaj novaj servoj por la membroj estas planitaj kaj kelkaj estas meze de la pretigprocedo, sed ili aperos kaj videblos laŭ finpretigo de ĉiu servo; inter ili ni povas mencii multe pli flekseblan serĉilon pri membroj, por ke oni povu serĉi gastigantojn/ĉiĉeronojn laŭ diversaj kondiĉoj, kaj eĉ administri propran liston de favoratoj. Ankaŭ plibonigoj pri la mapuzado estas planitaj.

Ankaŭ estis faritaj malgrandaj ŝanĝoj kaj estis solvitaj kelkaj problemoj en la datumbazoj de PS kaj TEJO kiu okazis kaŭze de ne bona funkciado de la antaŭe luita servilo.

Resume: prilaborado de la retejo daŭre progresas, kvankam la rezultoj ankoraŭ apenaŭ videblas.

ADOLESKA KOMISIONO

Raportas Adenjo Charrière, Komisiito pri Adoleska Agado

La adoleska komisiono kreiĝis surbaze de la konstato ke en IIK (Internacia Infana Kongreseto) en Kubo partoprenis multaj geinfanoj aĝantaj pli ol 14 jaroj. Tiu aĝ-kategorio ja ne havas specialan programon.

Ĝis nun estis kreitaj retlisto „adoleskuloj“ kie oni diskutu rilatajn temojn kaj vikio por ludoj.

Por estonteco oni planas krei datumbazon de ludoj kaj organizi aranĝon por adoleskuloj.

INFORMADO

Raportas Oleksandra Kovjazina, Estrarano pri Informado

Revuoj

Kontakto

Dum la pasintaj jaroj, *Kontakto* bedaŭrinde ne aperis regule. Krome aperis alia defio: perdo de kvanto de la abonantoj de *Kontakto*. Tial la estraro decicis okazigi enketumadon de potenciala legantaro, kaj laŭ ĝiaj rezultoj krei novan koncepton. Unu el la deciditaj ŝanĝoj estis la kunigo de *Kontakto* kaj *TEJO-Tutmonde*. Ĝi okazis tiel, ke en *Kontakto* estas kvar aldonaj paĝoj, kie *TT* transformiĝas al rubriko.

Somere 2010 TEJO lanĉis alvokon por nova redaktisto kadre de la nova koncepto de *Kontakto*, al kiu responde alvenis preskaŭ 30 kandidatiĝoj. Ni havis la malfacilan taskon elekti la plej bonajn kandidatiĝojn. La elektado okazis en du rondoj, kaj fine estis elektita Rogener Pavinski el Brazilo. Li estas filmisto, kunkreinto de la DVD *Esperanto estas*, muzikisto, i.a. voĉo de Supernova, kaj eksa estrarano de TEJO (2007-2009). Kun ŝanĝo de redaktisto de Kontakto ankaŭ ŝanĝiĝis la grafikisto. Rogener Pavinski nomumis kiel grafikiston Romulo Felicio el Brazilo.

Finfine aperis nova *Kontakto* kun tute nova aspekto, kaj refreŝigita enhavo. Ĝojigas min, ke la nuna *Kontakto* aperas regule. Ĝi ankaŭ modernigis kaj plifaciligis kontakton kun legantoj kaj kontribuantoj, pere de *Facebook*, *Twitter* kaj la retejo *kontakto.tejo.org*.

Ekde la numero 1:2011 *Kontakto* aperas laŭ nova koncepto kun aldonaj kvar paĝoj de *TEJO-Tutmonde*, kaj ekde la numero 2:2011 la rubriko *TEJO-Tutmonde* estas sub la redaktado de Dan Mrázek el Ĉehio.

TEJO-Tutmonde

Estas interese sekvi la evoluon de *TEJO-Tutmonde*, ek de la unua TT en 1982 sub redaktado de Estrarano pri Landa Agado Thomas Bormann. Ĝi komence estis simple broŝureto, kaj ĝi enhavis nur Komitatan Cirkuleron (nun kiam ekzistas retpoŝto tio tute ne imageblas). Poste ĝi iĝis gazeteto kaj nun ĝi ekzistas kiel rubriko de *Kontakto*.

Ekde 2009 TT spertis malfruegojn, ĝi komencis perdi sian aktualecon kiel oficiala komunikilo de TEJO, ĉar pro la evoluo de la teĥniko oni informiĝas el la reto multe pli frue ol alvenas TT (eĉ se ĝi venas ĝustatempe). Ne plu havis sencon eldoni paperan gazeton, kiun foje povas plene konsistigi jarraporto.

En la enketo pri *Kontakto* plimulto esprimis sin pozitive al movadaĵoj en la revuo *Kontakto*, kaj la Estraro laŭe decidis. Ŝanĝiĝis la vivo de TT; ĝi transiris al la paĝoj de la revuo *Kontakto* kiel movada rubriko (la resto de *Kontakto* daŭre restas nemovada) kie aperas pli kvalitaj artikoloj, tamen oficialaj raportoj de TEJO aperos aparte (kiel vi vidas je eldono de tiu ĉi.)

Komence de marto 2011 estis elektita kiel nova redaktisto por *TT* Daniel Mrázek. Mi en la komunikoj nomis la postenon „redaktisto por movadaĵoj de TEJO“ ĉar krom redaktado de la rubriko *TT* en *Kontakto*, li elektas kiuj materialoj aperos en la retejo *tejo.org* kaj sub la TEJO-rubriko de la revuo *Esperanto.*

Nicola Ruggiero ĉesis labori pri *TT* jam post la 3-a numero. La jara kolekto estas finita sub redaktado de diversaj redaktantoj. La lasta numero estis duobla (5+6:2010), redaktita de Marcos Cramer, kiu kolektis interesajn historiajn materialojn, kaj la numero 4:2010 kiun mi persone redaktis estas alvenanta al la abonantoj de la jaro 2010.

Retejo

Laŭ decido de la estraro antaŭeniras la ideo pri la nova retejo. TEJO bezonas retejon pli facile uzeblan. La nuna en pluraj manieroj konfuzas vizitantojn. La planata bazo por la nova retejo estas pmWiki. Mi kun helpo de Łukasz Żebrowski kaj aliaj ankoraŭ plipreciziga la postulojn por la retejo.

Informada fako

Mi jam alvenas al la fino de mia estrarperiodo. Mi planas preparigi vikipaĝon por la estonta Estrarano pri Informado, i.a. rekomendante ke la informada fako havu komisiitojn – la

laborkampo estas tre vasta; temas pri komunikado al membroj, al ne-membroj, en la neesperanta mondo, en paperaj komunikiloj, en la reto, kaj tiel plu. Ne povas unu homo fari ĉion ĉi.

Dum sufiĉe longa tempo la Estraro pripensis eldoni akcesoraĵojn (ekz. skribilojn, notlibrojn, saketojn ktp), sed tiu ideo ankoraŭ ne alvenis al sia realigo. Necesas trovi lokon/landon de produktado kaj ankoraŭ labori pri la grafika aspektigo.

Dum mia oficperiodo mi verkis kelkajn komunikojn, kvankam mi devas konfesi ke ne kreiĝis konstanta informfluo kun esperantaj amaskomunikiloj, kiel mi revis. Tamen funkcias nun la paĝoj de TEJO ĉe *Facebook* kaj *Twitter* kiel tre bona informkanalo. Ili estas regule ĝisdatigataj dank' al la TEJO-volontulo. Ankaŭ ekzemple *Pasporta Servo* havas paĝon ĉe *Facebook*, kaj same TEJO-Tutmonde kaj *Kontakto*.

KONTAKTO

Raportas Rogener Pavinski, redaktisto

Mi prenis la redaktoran taskon en septembro 2010 post elektiĝo en konkurso kun pli ol 20 kandidatoj.

Sub mia redaktado ĝis nun aperis 4 numeroj (239, 240, 241 & 242), de pluraj novaj proponoj multaj estis kaj estas iom post iom adaptataj kaj aplikataj en la revuo. Jen la ĉefaj el ili:

- Nuna enpaĝigisto estas Romulo Felicio el Brazilo, kiu kunlabore kun la redaktisto kreis novan grafikan koncepton kaj strukturon por la revuo.

- *Kontakto* ekde n-ro 2011:1 ricevis pliajn kolorajn paĝojn kaj nun entute havas 24 paĝojn anstataŭ 16 kiel ĝis tiam.

- Revenis al tradicia formato de la 90aj jaroj (277 x 198 mm) – pli facile tenebla.

- 4 paĝoj estas dediĉitaj al nova Rubriko „TEJO-Tutmonde" post estingo de la gazeto samnoma de TEJO.

- N-ro 239;240 estis duobla numero, kies reta versio estis libere elŝutebla de ne-abonantoj. Averaĝa kalkulo de tiaj elŝutoj estas 200.

- *Kontakto* plu estas tema revuo. Nun la revuo havas ĉefajn artikolojn kaj la cetero de la revuo estos plenigita de libertemaj artikoloj, intervjuoj kaj konstantaj rubrikoj. Tio permesas al *Kontakto* trakti ankaŭ aktualajn temojn, kiel Nuklea Energio (n-ro 242).

- Temo-sugestoj tamen estas daŭre proponataj por instigi verkadon.

- Premioj (mp3-diskoj el Vinilkosmo) estas lotumitaj inter kunlaborantoj.

- Starigo de retejo por la revuo (kontakto.tejo.org) kaj profiloj en sociaj retejoj kiel *Facebook*, *Twitter*, *Ipernity* kaj *Orkut*. Per ili *Kontakto* nepre pli intense kontaktiĝas kun sia publiko kaj kunlaborantoj per Interreto kaj la rezulto el tio ĉi estas ke kontribuaĵoj venas pli ofte, kaj la revuo ĝustatempas.

- Estis kreitaj rubrikoj kun konstantaj kunlaborantoj, ekz. „La Blaga Blogo“ de Viktoro Solé.

TEJO-TUTMONDE

Raportas Daniel Mrázek, redaktisto

Pri *TEJO-Tutmonde* mi redaktoriĝis la 25an de februaro. Ekde tiu tempo mi transprenadis la agendon. Pro kelkaj kialoj estis ioma malfruiĝo, tamen ĝis la 10a de aprilo mi sukcesis akiri artikolojn por la maja eldono de *Kontakto*. Skribante tiun ĉi raporton mi atendas provlegitajn tekstojn por la nuna eldono de *Kontakto*.

Ĉe http://www.tejo.org/eo/blog/8543 mi estigis blogon de TT, kie aperas aktualaĵoj.

La paĝon ĉe Vizaĝlibro (*Facebook*) ŝatas 356 homoj.

Establiĝas internacia teamo de kontribuantoj. La teamanoj devas esti „redakcio“, konstantaj kontribuantoj, kiuj interesiĝas pri tio, kiel TT funkcias. Eble iu el la teamo estos venonta redaktisto de TT. Tiu ĉi teamo tamen ankoraŭ establiĝas.

Plibonigendas kontribuado al la revuo *Esperanto*. Precipe mankas taŭgaj artikoloj, tamen mi mem scias, ke tio estas mia propra respondeco. Mi promesas, ke tion mi plejeble frue solvos.

Solvendas ankaŭ akiro de artikoloj. Ankoraŭ ne estas krizo, sed foje okazas, ke ne venos iu promesita artikolo, kio iom kaŭzas problemojn. Tamen mi estas tiukampe optimisto. Mi konscias, ke mi estas komencanto kaj je nova rolo mi ankoraŭ alkutimiĝas (kio alportas ne ĉiam tiajn rezultojn, kiajn mi jam dezirus), kaj mi konscias ankaŭ iun prokraston kaŭzitan precipe nun pro mia ŝtatekzameno.

Tamen mi pensas, ke *TT* funkcias.

TEJO-AKTUALE

Raportas Julia Noe, komisiita redaktisto de TEJO-aktuale

TEJO-aktuale estas retpoŝta informilo de TEJO. *TEJO-aktuale* estas senpage abonebla, aperas 2-semajnritme kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj. Ekde majo 2008 Julia Noe – tiama TEJO-volontulino – transprenis la redaktadon de *TEJO-aktuale. TEJO-aktuale* estas abonebla retpoŝte (*http://www.uea.org/retlistoj*) kaj legebla kaj printebla en sia retpaĝo (*http://www.tejo.org/ta*). Kontribuoj ĉiam estas bonvenaj per la retformularo en la retpaĝo aŭ retpoŝte al tejo-aktuale@tejo.org.

Statistikoj pri TEJO-aktuale de 09.06.2011:

Retpoŝtaj abonantoj

681

La nombro de la retpoŝtaj abonantoj restis pli malpli sama kompare kun la pasinta jaro, kvankam dum la ĝisdatigo multaj nefunkciantaj retadresoj estis forigitaj.

Vizitantoj de la retpaĝo:

Statistiko ekde 2004-04-26
La paĝaron vizitis entute 12465 personoj.
Entute la paĝoj estis ŝarĝitaj: 358275 fojojn.

LISTO DE MALLONGIGOJ

CO – Centra Oficejo
EJF – Eŭropa Junulara Fonduso; oficiale: European Youth Foundation (EYF) / Fonds Européen pour la Jeunesse (FEJ)
E@I – Edukado ĉe Interreto
FoJE – Forumo de Junularo Eŭropa; oficiale: Youth Forum Jeunesse (YFJ)
IIK – Internacia Infana Kongreseto
IJK – Internacia Junulara Kongreso
ILEI – Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
KER – Komisiono pri Eksteraj Rilatoj
KODEJO – Kompleta Demandaro por Esperantistaj Junularaj Organizoj
LKK – Loka Kongresa Komitato
LS – Landa Sekcio
PS – Pasporta Servo
SEL – Skolta Esperanto-Ligo
TEJO – Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
TT – TEJO-Tutmonde
UEA – Universala Esperanto-Asocio
UK – Universala Kongreso
UNESKO – Unuiĝint-Naciara Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo; oficiale: UNESCO